
Ekumena Kolekto
La Sankta Evangelio de Jesuo
Domo sur roko
Soldatetoj de Dio
LBV

William Luz

# Domo sur roko

Rakonto laŭ inspiro de la Sankta Evangelio de Jesuo laŭ Mateo, 7:24 ĝis 28.

San-Paŭlo/ SP — Brazilo — 2023
Eldonejo Elevação

www.ReligiodeDio.org



# ENHAVTABELO


| | |
|---|---|
| TRAKTAĴO PRI LA NOVA ORDONO DE JESUO | 3 |
| RAKONTO | 7 |
| KOMENTO | 19 |
| INFANO INSTRUAS AL HOMO (ALZIRO ZARUR) | 21 |
| KAJERO DE EKZERCOJ | 22 |
| JESUO, LA EKUMENA KRISTO, LA DIA ŜTATESTRO | 42 |
| VORTARETO DE LA RAKONTO | 46 |
| INFORMOJ | 47 |






Ni legu ĉi tiujn valorajn instruojn de Jesuo kun niaj gepatroj:



# Traktaĵo pri la Nova Ordono de Jesuo,

arANĝita de Paiva Netto, akorde kun la Evangelio de la Kristo de Dio laŭ **Johano**, 13:34 kaj 35; kaj 15:7, 8, 10 ĝis 17 kaj 9.

Instruis Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro*:

*"13:34 Novan Ordonon Mi donas al vi: vi amu unu alian, kiel Mi vin amis.*





IRU AL LA SEKVA PAĜO

13:35 *Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi*
*estas miaj disĉiploj, se vi havos Amon*
*unu al alia.*
15:7 *Se vi restadas en mi, kaj miaj*



*vortoj restadas en vi, petu kion*
*ajn vi volos, kaj tio estos farita*
*por vi.* 15:8 *En tio mia Patro estas*
*glorata, ke vi donas multe da frukto;*
*kaj vi estos miaj disĉiploj.*
15:10 *Se vi observos miajn ordonojn, vi*
*restados en mia Amo tiel*
*same, kiel Mi observis la*
*ordonojn de mia Patro*
*kaj restadas en Lia*
*Amo.*
15:11 *Tion Mi parolis*
*al vi, por ke mia ĝojo*
*en vi restadu, kaj via ĝojo*
*estu plena.*





IRU AL LA
SEKVA PAĜO

15:12 Jen estas mia Ordono:
ke vi amu unu
alian tiel same,
kiel Mi vin
amas. 15:13 Neniu
havas Amon pli grandan ol
tio, ke iu demetus sian vivon
por siaj amikoj.



15:14 Vi estas miaj amikoj, se vi
faras tion, kion Mi al vi ordonas.

15:17 Kaj Mi tion ordonas: vi amu
unu alian, kiel Mi vin amis.

15:15 Mi jam ne nomas vin sklavoj,
ĉar la sklavo ne scias, kion lia
sinjoro faras; sed Mi nomis vin
amikoj, ĉar ĉion, kion Mi lernis de
mia Patro, Mi sciigis al vi.



IRU AL LA
SEKVA PAĜO



*15:16 Vi ne elektis min, sed Mi
elektis vin, kaj starigis vin, por ke
vi iru kaj donu bonan frukton,
kaj ke via frukto daŭru; por ke la
Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi
petos de Li en mia nomo.
15:17 Tion Mi ordonas al vi: ke vi
amu unu la alian, kiel Mi amas
vin. 15:9 Kiel la Patro min amas,
tiel Mi ankaŭ vin amas. Restadu
en mia Amo".*



⋆ **Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro** — Legu pli pri tiu temo en la paĝo 42.

# Domo sur roko

Rakonto laŭ inspiro de la Sankta Evangelio de Jesuo laŭ Mateo, 7:24 ĝis 28.






GRANDA HOMAMASO KUNIĜIS POR AŬDI LA INSTRUOJN DE JESUO. LA INFANOJ, KIUJ ĈIAM ENTUZIASMIĜIS DUM LA RENKONTIĜOJ KUN LA DIA MAJSTRO, KLOPODIS ESTI PROKSIME DE LI. KIOM DA ĜOJO ILI SENTIS EN SIA KORO!



En unu el tiuj specialaj momentoj, Jesuo rakontis la jenan parabolon:





— ĈIUJ HOMOJ, KIUJ AŬDAS MIAJN PAROLOJN KAJ ILIN PRAKTIKAS ESTAS TIEL SAĜAJ KIEL TIUJ, KIUJ KONSTRUAS SIAN DOMON SUR GRANDA, SOLIDA ROKO.


— EBLE FALOS JA TEMPESTO, EBLE OKAZOS INUNDOJ AŬ FORTAJ VENTOJ FRAPOS LA DOMON,...





***... SED ĜI NE FALOS,***
***ĈAR ĜI ESTIS***
***KONSTRUITA SUR***
***FIRMA ROKO.***





— SED KIU AŬDAS MIAJN PAROLOJN KAJ NE PRAKTIKAS ILIN, TIU ESTAS MALSAĜULO, KIEL HOMO, KIU KONSTRUAS SIAN DOMON SUR SABLO.


— Kio estas malsaĝulo?
— Tio estas homo, kiu agas senpense, senzorge.




Jesuo finis la parabolon, dirante:

***— Ĉar kiam alvenos pluvoj kaj inundoj, kaj fortaj ventoj trafos la domon, kiu estis konstruita sur sablo, tiam ĝi falos. Kaj granda estos ĝia falo.***









Ĉiu tre miris pri la aŭtoritateco, per kiu Jesuo instruis per la parabolo, kaj ili konservis en sia koro tiujn valorajn instruojn de la Majstro inter ĉiuj majstroj.



# Komento

**William Luz**

Karaj Soldatetoj de Dio, multaj homoj vivas en domoj konstruitaj en netaŭgaj lokoj, tio estas, kiuj ne estas sekuraj, kaj igas riska la vivon de tieaj loĝantoj. Kaj ni devas ĉiam klopodi solvi tiajn aferojn en la mondo, per helpado al niaj homfratoj. Sed en ĉi tiu parabolo rakontita de Jesuo, kiam Li parolas pri domo, Li aludas al nia koro, al nia vivo, kaj montras al ni, ke se ni sekvas Liajn instruojn kaj praktikas ĉion, kion Li instruis al ni, kune kun preĝado kaj bonaj agoj, tiam ni estos konstruantaj nian vivon sur roko, tio estas, metantaj nian vivon sur fundamenton de pli sekura, feliĉa vojo, kiu alportas verajn Pacon kaj kuraĝon. Kaj eĉ fronte al la malfacilaĵoj de la



Iru al la sekva paĝo



## FRATO PAIVA

VIVO, KIUJN REPREZENTAS EN ĈI TIU PARABOLO LA PLUVOJ, LA VENTOJ KAJ LA INUNDOJ, SE NI STARAS SUR FIRMA ROKO, KIU ESTAS JESUO, TIAM NI ESTOS EFEKTIVE SEKURAJ. TIEL, NI MEMORU ĈI TIUJN PAROLOJN DE FRATO PAIVA: ***“KUN JESUO, NI ĈIAM VENKOS ĈIAM, ĈIAM!”*** KAJ PLIE: ***“KONSTRUU VIAN ESTONTECON SUR FIRMA ROKO, NOMATA JESUO, KAJ VIA ANIMO NENIAM SKUIĜOS, EĈ FRONTE AL PLEJ MALBONAJ TRAVIVAĴOJ”.***

# Infano instruas al homo

**Alziro Zarur** (1914-1979)

Infanoj kantas
Antaŭ mia fenestro!
Sur ĉi tiu mizera mondo,
Ĉu eblas io pli bela?


Ĝojo puriganta
Iras tra la najbararo...
Nenio estas pli altspirita
Ol infana kantado!

Kiam alvenos tempesto
Minacanta vian hejmon,
Estu nur Bona Volo:
Infano kantanta!

# Kajero de ekzercoj

## KIU EL LA PARTOJ ĈI-SUBE MONTRATAJ APARTENAS AL LA BILDO?





# Respondo

4

Sekva ekzerco

# HELPU LA SAĜAN HOMON IRI ĜIS LA BRIKOJ




Respondo
4
Sekva ekzerco

# KUNLIGU LA PARAJN AĴOJN


1


A


2


B


3


C


4


Ĉ


5



D

# Respondo

**1-B; 2-Ĉ; 3-A; 4-D; 5-C.**

Sekva ekzerco

**KIOM DA BRIKOJ TROVIĜAS EN LA ĈI-SUBA BILDO?**




# Respondo

**37**

Sekva ekzerco

# ELTROVU LA FRAZON








# Respondo

**DIO ĈEESTAS!**

Sekva ekzerco

# TROVU LA OMBRON



# Respondo

**B**

Sekva ekzerco

# TROVU LA FIGURON EGALAN AL TIU, KIU ESTAS ELSTARIGITA















# Respondo

c

Sekva ekzerco

# TROVU LA VOJON MALPLI VALORAN




# Respondo


## VERDA VOJO (10)

Sekva ekzerco

## HELPU LA AMIKOJN TROVI UNU LA ALIAN



# Respondo



## Sekva ekzerco

# TROVU LA 5 ERAROJN





# Respondo





# Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro

Al gepatroj, respondeculoj kaj edukistoj, ni prezentas ĉi tiun koncepton kreitan de la Prezidanto-Predikanto de la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito, José de Paiva Netto, okaze de historia intervjuo, kiun li donis en la jaro 1989, al la produktanto de dokumentaj filmoj por la pola televido, tiutempe Vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio, ĵurnalisto Roman Dobrzyński. Tiuokaze, Roman analizis la mision

de la Templo de Bona Volo (TBV), la Templon de la Dia Ekumenismo, kiun Paiva Netto estis inaŭguronta je la 21-a de Oktobro tiujara, en la urbo Braziljo/DF, en Brazilo, kaj demandis la estron de la Religio de la Universala Amo pri tio, kiel li povas prediki Senliman Ekumenismon, parolante pri Jesuo. Tiam, Paiva Netto parolis pri tiu temo, kaj resumis jardekojn de sia predikado pri tiu fundamenta temo en la doktrino de la Religio de la Tria Jarmilo: *"Unu el la grandaj taskoj de la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito, kara Roman, estas malsektigi Lin, ĉar Jesuo estas la Ekumena Kristo, do universala. (...) La Dia Majstro* ***ne estas limigita****. Li estas la Ĉiela Idealo de Homeco, Amo,*

*Solidareco, Justeco kaj Kompatemo al ĉiuj estuloj spiritaj kaj homaj.* ***Jesuo estas ĉiutaga konkerado por tiuj, kiuj soifas pri Scio, Mizerikordo, Frateco, Grandanimeco, Libereco kaj Egaleco, laŭ la Universala Leĝo de Reenkarniĝo. Jesuo, en Si mem, ne konsistigas faktorojn de rankoro kaj militoj.*** *Li predikis, en Sia Nova Ordono —* 'Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj' *(Evangelio laŭ Johano, 13:34 kaj 35) —, Amon je senlima potenco. Tio, kion la surteraj estuloj faris al Lia Mesaĝo, estis krei reduktan version de ĝi (...). Riveli la altan signifon de Lia Evangelio kaj de Lia Apokalipso, sen malamema maltoleremo, tio estas, laŭ Spirito kaj*

*Vero, sub la lumo de Lia Nova Ordono de Frata Amo, jen estas la elstara servo, kiun la Religio de Dio, de la Kristo kaj de la Sankta Spirito faras al la monda socio (...)”.* Indas substreki, ke Roman fariĝis admiranto kaj diskoniganto de tiu Idealo de Bona Volo, kaj li konstante sendis al la Religio de la Universala Amo historiojn kaj spertojn travivitajn okaze de liaj prelegoj kaj instruoj en diversaj lokoj tra la mondo, interalie tiuj, kiujn li prezentis en la Universitato de Pekino, en Ĉinujo.





# Vortareto de la rakonto

**Dia Ŝtatestro:** Esprimo kreita de Paiva Netto, kiu indikas, ke Jesuo estas la Dia Reganto de niaj vivoj kaj de la planedo Tero.

**Ekumena:** Universala; rilata al la tuta Universo kaj al ĉiuj estuloj.

**Evangelio:** Bona Mesaĝo, Bona Novaĵo.

**Parabolo:** Nelonga rakonto, kiu transdonas altspiritan mesaĝon aŭ instruon.

**Skui:** Kaŭzi grandan ŝancelon al iu aŭ io.

**Aŭtorrajto © 2023 de** Eldonejo Elevação
**Aŭtoro:** William Luz
**Eldonado, desegnoj kaj revizio:**
Skipo Soldatetoj de Dio
**Kunordigado kaj desegnoj:** William Luz

Ĉiuj rajtoj pri ĉi tiu eldono apartenas
al Eldonejo Elevação.
Rua Doraci, 2-A, sala 103, Bom Retiro
CEP 01134-050 – São Paulo/SP — Brasil [Brazilo]

ELEVAÇÃO

www.elevacao.com.br